N. N. 41,

# La dom' de l' Leviĝanta Sun'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Jen dom' en Nova Orlean'.
Konata estas ĝi.
Perdiĝis multaj inoj jen,
Ho Dio, ankaŭ mi.

Ankoraŭ estus hejme mi
Kaj estus ĉe l' patrin',
Sed estis mi tro stulta ja,
Forlogi lasis min.

Ho, mia kara fratinet'
Ne agu kiel mi!
De l' dom' de l' Leviĝanta sun*,
Detenu vin de ĝi!

Al Nova Orleano mi
Reiri devas nun,
Pluvivi tie en la dom'
De l' Leviĝanta Sun'.

*Traduko de la Angla poemo "The House of the Rising Sun" de N. N. 41 en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-147-2 / Arg-718-1443 (2012-12-09 22:32:45)*

*La muziknotoj troviĝas ekzemple en* `http://www.free-notes.net/cgi-bin/nten_SongImage.pl%3Fsong%3DThe%2BHouse%2Bf%2BThe%2BRising%2BSun%26low%3D64%26variantNo%3D0`.